ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

N-o 42, 24. Julio 1921. | Ĵurnalo internacia, universala, sendependa eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.) | ★ Eliras semajne. ★

La Kongreso de l' Kongresoj.

Komerca ĉambro de Béziers (Franc.) por Esperanto.

Niaj Korespondantoj

skribintaj aŭ skribontaj al ni en nunaj tagoj pri ne nepre gravaj aferoj, ne atendu respondon, ĝis post la kongreso de Praha, pro la dusemajna forvojaĝo de la redaktoro.

Por ŝpari al ni individuan respondon al ĉiu opa demandanto, ni informas, ke

N-oj 1—24 de ET estas elĉerpitaj.

Haveblaj estas nur kelkaj ekzempleroj de la specimena numero kaj de n-oj 9, 18, 19 kaj 22. Elĉerpiĝontaj estas ankaŭ n-oj 25, 26 kaj 37.

2500

estas nun la minimuma eldonnombro de ET; la nombro de la abonantoj kaj regulaj aĉetantoj estas ĉ. 2000. De la dumkongresaj numeroj ni presos 3000 ekzemplerojn.

Por propagandaj celoj

ni konsentas rabaton de 40% je la abonprezoj de nia ĵurnalo, se ĝi estas abonata por regula sendado al neesperantistaj estraroj, komercaj ĉambroj, redakcioj, bibliotekoj, legejoj, ktp.

Eldonejo de ET.

Praha.

Kiel la kongresanoj interesiĝas pri la fakaj kunvenoj.

(Ekstrakto el la ĝis 12-a de julio resenditaj aliĝiloj.)

Arkitektoj 6, ĉastemuloj 16, fervojistoj 28, filatelistoj 61, framasonoj 34, hebrea nacio 16, instruistoj 177, junularo 9, ĵurnalistoj 19, katolikoj 45, komercistoj 78, kristanoj 18, kuracistoj 26, laboristoj 19, Liberiga Stelo 48, liberpensuloj 69, malgrandnacianoj 38, oficistoj 52, pacifistoj 64, poŝtoficistoj 27, psikistoj 73, Ruĝa Kruco 24, sciencistoj 50, skoltoj 29, socialistoj 53, sportistoj 10, studentoj 53, ŝakludantoj 20, teosofoj 49, UEA 96, vegetaranoj 27, virinoj 68.

Gvidado tra Nürnberg.

Partoprenontoj de la Praha Kongreso estos gvidataj tra Nürnberg dum sia tiea restado de s-o Friĵ Westernacher, Nürnberg, Schwabacherstr. 68, telefono 6526. Nia samideano sin donos al la fremduloj dum la tuta tago. Ĉian informon pri Nürnberg donos la Esp. Kartelo Nürnberg-Fürth en Nürnberg, Ostendstr. 173 (prez. Otto Pilhofer).

Programo de la Esp. Soc. Karlsbad post la Dektria.

Alveno en Karlsbad B. E. B. l u n d e, 8. aŭg., 22.33 h. Akcepto per la loĝa komitato, asigno de la loĝejoj.

M a r d e, 9. aŭg., je 7 h. rigardado de la fontoj kaj de la kuracvivo; matena koncerto ĉe Sprudel (ŝprucfonto) kaj Mühlbrunn. Poste komuna matenmanĝo. Je 9 h. rigardado de la urbaj kuracaj instalaĵoj, Sprudel-kaptumaĵo, Kaiserbad, Sprudelsalo-fabrikado, fluigado de la natura karbonacido de l' Sprudel, laŭ intereso de la partoprenantoj, sub gvidado de la ĉefinĝenieroj. Je 11 h. oficiala saluta kunveno en kafejo „Sans-souci", Goetheweg. Je 13 h. komuna tagmanĝo. Je 16 h. senpaga altenveturo per ŝnurega fervojo al „Freundschaftshöhe", tie senpaga posttagmeza manĝo donata de la urbestraro. Laŭvole ekskursoj piede aŭ aŭtomobile en la belan ĉirkaŭaĵon. Je 20 h. ĝardenkoncerto en la rest. „Stadtpark", laŭvole ankaŭ vizito al teatro, varieteo, kabaredo, dancejo ktp.

M e r k r e d o n, 10. aŭg., je 5.18 h. forveturo al Joachimstal, la fama radiumbanejo.

Partoprenantoj, kiuj intencas fari la vojaĝon nur ĝis Karlsbad aŭ Joachimstal kaj restadi tie, estas petataj sin anonci ĉe la Esp. Soc. Karlsbad, ĉar la vizito de la banloko tiun-ĉi jaron estas tiel multnombra, ke la grupo ne povus garantii konvenajn loĝejojn sen antaŭa anonco. Aldonu respond-markon.

Respondo je Respondo.

En numero 40-a de „Esperanto Triumfonta" s-o Alo kritikas la proponon de Pola Esperantista Societo, celantan enkondukon de Esperanto en ĉiulandajn lernejojn, kiel devigan instruobjekton. Li dividis sian artikolon je 4 punktoj, do mi provos respondi al li je unu punkto post alia.

„La demando pri la instruado de Esperanto povas esti proponata nur, kiam oni estas absolute, preskaŭ matematike certa pri la sukceso, ĉar forjeto povas esti granda malvenko", skribas s-o Alo. Mi opinias, ke jam tio estas eraro. Efektive, ĉu niaj finnaj samideanoj estis „matematike" certaj, ke ilia peto pri la ŝtata subteno estos akceptata de la parlamento? El tio, kion mi legis, mi vidas, ke ili havis preskaŭ nenian esperon je la sukceso. Tamen ili provis kaj pravigis proverbon, ke „Dio helpas al kuraĝulo". Erare ankaŭ estas pensi, ke malakcepto de nia propono estos aŭ povos esti „granda malvenko". Jam la fakto, ke oni en parlamentoj pridiskutos tiun temon, ebligos al ni fari gravan propagandon. Vere, malfacile estus pensi, ke inter ĉiuj deputitoj troviĝos nek unu favora por Esperanto. En plej malfeliĉa kazo, t. e. opiniante, ke la propono estos forjetata, ununura deputito povos fari propagandon pli efikan ol multjara laboro de esperantistaj societoj. Lia parolado ja estos aŭskultata de milionoj da homoj, kaj tiam eble estos pli malfacile trovi homon, kiu, kiel itala delegito en la konferenco de Ruĝa Kruco, nenion scios pri ekzistado de Esperanto.

Kio koncernas tion, ke la esperantistaro ne posedas sufiĉan kvanton da instruistoj, mi devas nur atentigi, ke ĝis nun la instruado de Esperanto estis laŭvola honora okupo de sindonemaj unuaj. Bonvolu nur pripensi, ĉu vi trovus sufiĉe da instruistoj de franca aŭ germana lingvo, se tiu instruado estus senpaga? Tiu manko estos sentebla ĝis la deviga enkonduko de Esperanto en la ŝtatajn lernejojn. Post la realigo de tiu revo

---

Esperantologio kaj Esperantologoj.

De *Eugen Wüster.*

(Fino.)

[Kiu ne pli funde kaj mem kapabla sekvi la kvar postulojn praktike okupis sin pri Esperanto, eble ne kredos al ni; al tiuj ni ne povas ĉi tie meti la tutan mizeron antaŭ la okulojn.]

La kaŭzo estas tute klara: Oni lastinstance de ĉiu unuopa uzanto de Esperanto postulis memstaran kontentigon de tiuj kvar postuloj, per tio, ke escepte kelkajn milojn oni ne disponigis al li taŭgajn esprimojn por la milionoj da homaj ideoj, sed lasis al li mem, pokaze trovi tiajn. Tio signifas unue malbonkvalitecon de la enuziĝanta lingva materialo, due nekalkuleblan malŝparon de energio (ne estas mirige, ke ĉe tiu stato valoraj homoj ne povas riski [orgininalan] verkadon, kiu plejparte ŝanĝiĝus al vortara laboro!), trie kompletan diverĝon, malakordon de la esprimoj laŭ la aŭtoroj, laŭ la landoj.

Laŭ la landoj, ĉar eĉ la aŭtoroj de la kondukantaj vortaroj neniel estas kapablaj al zorga vortara laboro. Ne nur ĉar ili mem preskaŭ neniam kontentigas ĉiujn antaŭkondiĉojn de esperantologoj (v. pli malsupre) sed, ankoraŭ pli decide, pro ekonomiaj kaŭzoj. Se ili volus sisteme verki vortaron, havante nur la ĝisnunajn bazojn kaj tial esplorante vorton post vorto (kaj sinteze) la diversajn konsiderendaĵojn, ili bezonus la 100-oblon de la tempo hodiaŭ dediĉata al la tradukado de samampleksa literaturaĵo. Ĉar plie, kiel jam dirite, ili devus esti veraj esperantologoj — kiu eldonisto povus aŭ volus pagi la faritaĵon? Respektive kiu evoluciinta al riĉa homeco aŭtoro povus aŭ volus sen konforma kompenso en tia cerbo- kaj kapodetrua laboro foruzi konsiderindan parton de sia vivo kaj donaci la rezultaĵojn — ne al la tuta esperantistaro, sed, ĉe la hodiaŭa aferstato, nur al parto de sia nacio kun la certeco, ke la alinacianoj preskaŭ ne atentos ĝin? (Kaj lingvo tiel prizorgata pretendas sincere esti internacia interkomprenilo!) Pro manko de centra registrado ja homoj, kies tempo estas valora — kaj tiel estas pri ĉiuj, kiuj havas por diri gravaĵojn — preferas silenti ol, prezentante siajn sugestojn en esperanta gazeto, tordi ŝnurojn el sablo.

Se oni iomete klopodos pripensi pri la esenco de la lingvo, oni komprenos, ke la sistema lingva laboro devas esti farata, do ke la sorto de la internacia lingvo povas esti metata nur en la manojn de specialistoj; kaj ke tiu sistema lingva laboro ne povas esti farata cent fojojn anstataŭ unu kaj devas esti farata tiel, ke ĝiaj rezultaĵoj atingu la tutan lingvanaron, kaj ke aliaflanke la tuta lingvanaro devas liveri la materian bazon, do ke ĝi devas esti farata en centra loko kaj ĝiaj rezultaĵoj devas esti deponataj en centra, ĝenerala alirebla loko, nome en **Vortar(eg)o de oficiale rekomendataj esprimoj (R. V.)**; unue eble, ĉar la afero urĝas, en **Provizora Vortar(eg)o**, kian **Zamenhof** mem postulis en sia **Lingva Respondo 58 (1911)** kiel „ekstreme bezonatan" kaj fine, ĉar neniu faris komencon, decidiĝis, malsana kaj maljuna, verki mem en 1917 (kiel detalan esperantan-germanan vortaron); ĉe tio l' o grava ne estas la oficialeco — por praktikisto indiferentega kaj en la hodiaŭa frizo, kvazaŭa batalkrio, eĉ ridinda kaj incita — sed la garantio de unueca uzo (nomi tion „blinda imito al aŭtoritatuloj" estas erarkompreno) kaj de taŭgeco.

[Eble oni riproĉos nin pri idista pensmaniero. Efektive ni malkaŝe konfesas, ke se Ido diferencus de Esperanto sole per metodeco kaj ne ankaŭ per sia strukturo kaj kelkaj aliaj principoj, kaj se ne estus la sociologia konsidero al la publiko ĝis nun skeptika rilate la helpajn lingvojn ĝenerale kaj la jama disvastigiteco de Esperanto, ni estus idisto. Se ankaŭ la esperantistoj sisteme procedus, pripensemaj idistoj apenaŭ havus kaŭzon daŭrigi sian apartiĝon, ĉar hodiaŭ ili nur subtaksas la gravecon de la tri negativaj se; **sed se la esperantistoj ne forlasos sian indiferenton rilate la 4 postulojn, precipe la 1-an, tiam estas absolute certe, ke skismaj tendencoj similaj al la idistaj pli malpli frue revekiĝos,** kiam la homoj volos fari pli ampleksan praktikan uzon de Esperanto kaj ne nur kiel hodiaŭ celas la ĉefprincipon sole.]

Post kiam la morto malhelpis Zamenhofon efektivigi sian intencon, ni sinteze kaj internacie komencis prilabori la plej gravan ĝisnunan lingvan materialon por liveri al sistemaj vortaraj laboroj fidindan bazon*). Kiam ni havos la garantion, ke la esperantistaro trovis unu veran esperantologon aŭ pli da ili por verkado de tia **R. V.**, ni plezure disponigos al (i)li la manuskripton kun la troviĝantaj preskaŭ ĉe ĉiu lingvero notoj rilate la kvar postulojn.

Kiajn kvalitojn la esperantologoj devos posedi?

a) Pro la praktika postulo kaj pro la postulo 3 idean universalecon kaj posedon de la teorio de praktiko ankaŭ de aliaj helpaj lingvoj.

b) Pro la postulo 2 konon (teorio) kaj scion (praktiko) de la ĉefaj modernaj kaj antikvaj lingvoj de la eŭropa-amerika kulturorondo.

c) Pro la postulo 3 universalan konon de la esperantaj teorioj, lingva materialo kaj praktiko: esperantan mondmemoron; devas esti kompensata la manko de la komuna konkretiĝinta en la lingvo mondmemoro, kiu penetras la sangon de la anoj de l' naciaj lingvoj ekde plej frua juneco.

Por ke tiuj intelektaj kvalitoj estu taŭge utiligataj, plue necesas

d) intelekta-morala: tiu memkonsista arda celado al interakordigo de spertoj, kiun supre ni nomis karakterizaĵo de vera scienco kaj kiu per si mem entenas perfektan objektivecon. Kaj

e) morala: rilate la komisiintojn kaj la homaron ĉiam maldormantan senton de prirespondeco.

Ni konscias, ke ni starigas postulojn tre altajn kaj prefere ne tuŝas la demandon, kiu resp. ĉu

*) Oni legu en la junia numero de **Esperanto-Praktiko** la raporton pri nia trivoluma esperanta-germana vortaro preparata por publico de granda germana eldonejo.

esperantista ĝi malaperos, ĉar esperantistaj instruistoj estos same pagataj, kiel instruistoj de aliaj objektoj.

Min persone plej forte mirigis la 3-a punkto, kie s-o Alo diras, ke la propono de Pola Esperantistaro eble havos ian sukceson en ŝtatoj kun federacia sistemo, sed neniam sukcesos en ŝtatoj kun alcentriga sistemo. Ĉu la decido de parlamento ne estas same deviga en Francio aŭ Polio, kiel en Usono?

En la lasta punkto de priparolata artikolo ni trovas jenajn vortojn: „Koncerne la publikan opinion la rutino ne estas ankoraŭ venkita". Kiel pruvon s-o Alo citas la prokraston de la diskuto pri Esperanto kaj fakton, ke itala delegito en Ruĝkruca Konferenco ne sciis, kio estas Esperanto! Mi nur demandos, kiom da jaroj ni jam propagandas? Kaj kian rezultaton ni atingis? Tian, ke estas eminentuloj nenion sciantaj pri Esperanto! Mi eĉ opinias, ke ne novaj parlamentaj provoj, sed plua konservado de la ĝisnuna propaganda taktiko estos danĝera por ni. Ĉu vi neniam aŭdis de neesperantistoj, ke Esperanto havas nenian estontecon, ĉar ĝi ekzistas jam tiel longe kaj oni pri ĝi nenion aŭdas? Eble proponita de s-o Alo taktiko de laŭgrada enkonduko de Esperanto havos ian sukceson en certaj ŝtatoj, sed li forgesas, ke ekzistas ŝtatoj, kies internaj cirkonstancoj malebligas tion.

Por tiuj landoj la parlamenta diskuto havos grandan valoron, eĉ se la propono mem ne estos akceptata.

Do mi ripetas, ke eĉ la malakcepto de tiu propono ne estos malvenko. Pli granda danĝero estas en restado ĉe la malnova taktiko.

Finante, mi alvokas ĉiujn al subteno de la polaj samideanoj en ilia propono kaj petas fari provon! *Vladislavo Mergel, Praha.*

* * *

La bulgara parlamento jam voĉdonis la leĝoprojekton de la Ministerio de Popola Instruado. Per tiu voĉdono Esperanto estas enkondukita en bulgaraj gimnazioj kiel nedeviga lernobjekto. De la jaro 1921/1922 la bulgaraj lernantoj lernos nian belan lingvon, de la lernejo ankaŭ oni instruos al ili internacian lingvon kaj sentojn pri la homamo, frateco kaj internacieco.

Estas ja granda sukceso por ni kaj por nia movado, kaj ni ĝojas, ke ni povas nin saluti per ĝi antaŭ nia jara kongreso (14. kaj 15. aŭg. en Sofia) kaj antaŭ la 13-a. Mi utiligas la okazon esprimi mian konsenton kun la propono de la Pola Esperantista Societo, presita en n-o 36 de ET sub titolo „Ĝis kiam ankoraŭ". Mi certigas, ke la bulgara parlamento konsentos enkonduki Esperanton devige en niaj lernejoj kaj donos sian promeson fari ĉi tion al la proponata kaj elektota komisiono. Tial ni, la bulgara esperantistaro, insistas, ke oni elektu tian komisionon kaj per tio preparu nian sukceson. *D. Simeonov, Sofia.*

Komerco.

Komerca ĉambro de Béziers favora.

La komerca ĉambro de Béziers (56000 loĝantoj; vino, alkoholo) aliĝis al la decido de la pariza komerca ĉambro kaj voĉdonis subvencion de 50 frankoj por la grupo „Béziers'a Stelo". La sumo ne estas pli alta, ĉar je la jarfino la kaso estas malplena. La prezidanto de la komerca ĉambro mem monhelpos la grupon ĉe l' komenco de la lerneja jaro. Tiam f-ino Roksano (J. Flourens) oficiale malfermos kurson por la lernantoj de la komerca lernejo.

Béziers kaj ĝia ĉirkaŭaĵo produktas 6—8 milionojn da hektolitroj da vino.

Internacio Katolika.

Unua internacia katolika junula kongreso.

„Mondjunularo Katolika" (Moka) aranĝos la 11-an kaj 12-an de aŭgusto 1921 en Graz (Stirio) sian unuan internacian katolikan junulan kongreson. Invitoj estas senditaj al ĉiuj katolikaj junulaj societoj de la tuta mondo. Ĝis nun jam anonciĝis partoprenantoj el Svisujo, Belgujo, Polujo, Germanujo, Austrujo, Jugoslavujo, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo, Hollando, Italujo, Hispanujo. Dum la kongreso oni pritraktos la plej gravajn demandojn de la tutmonda katolika junularo, plue oni fiksos la definitivan statuton kaj elektos la prezidon. La oficiala lingvo de la kongreso estos Esperanto. La referantoj dum la kongreso, s-o prof. W. Arnold el Zug (Svisujo), afergvidanto de Moka, kaj la ĉefsekretario de Moka, s-o Hanns Sappl, Graz, parolos en Esperanto.

Moka petas ankoraŭfoje ĉiujn katolikajn gejunulojn, kiuj scias Esperanton, partopreni tiun kongreson, kiu fariĝos unu el la plej potencaj manifestoj de la katolika junularo. Ĉiujn pluajn informojn ktp. donas volonte la kongreskomitato en Graz, Karmeliterplatz 5.

Virinoj.

Al ĉiulandaj samideaninoj!

Ni volas revivigi ĉe la XIII-a la neŭtralan „Universalan Virinan Asocion" por la bono de nia komuna afero.

La okazintaĵoj de la lastaj jaroj montras evidente, precipe al virinoj-esperantistinoj, ke la sorto de l' virino kaj de l' infano povus esti facile solvata per devizo: „Virinoj de l' tuta mondo unuiĝu!" — La ilo por tiu unuiĝo estu „Universala Virina Asocio" kun celo disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto en ĉiuj internaciaj kaj naciaj virinaj ligoj, asocioj kaj societoj.

Tial ni kunvokas ĉe la XIII-a la **fakan virinan kunvenon** kun tiu ĉi programo:

1. Parolo pri la spertoj kaj la disvastiĝo de Esperanto en naciaj kaj internaciaj societoj virinaj, speciale pri la neceseco forigi la lingvajn malfacilaĵojn, kiuj malhelpas la internacian virinan movadon; kaj parolo, kiamaniere reformi la leĝojn en la intereso de la virinoj kaj de la infana edukado.

2. Elekto de prepara komisiono, kiu studos la tutan demandon kaj publikigos dum la jaro la preparitajn projektojn en la gazetoj esperantistaj eĉ naciaj, kaj kiu prezentos ĉiujn ellaboritajn proponojn al la faka virina kunveno aranĝota ĉe la XIV-a kongreso.

Priparoli povas la diverslandaj reprezentantinoj, kiuj anoncos sian parolon antaŭ la kongreso al la kunvokantino.

La demandoj sub la adreso:

F. Nesmerakova,
Praha-Vršovice, Barakova 174.

XI-a Germana Esperanto-Kongreso en Breslaŭ

(3.—6. junio 1922.)

Dua Komuniko.

La kongreso okazos dum Pentekosto. La motivoj por ĉi tiu tempo estas tiel gravaj, ke ni esperas, ke la gesamideanoj ankaŭ kompleze interkonsentos kun ni.

1. Se la germana kongreso okazus senpere antaŭ la internacia XIV-a, ĝi nur havus la karakteron de antaŭkongreso.

2. La nombro de la partoprenontoj en ĉi tiu okazo estus malpli granda ol je Pentekosto. Sed tre granda nombro de partoprenontoj estas nepre dezirinda por la pli rapida disvastiĝo de nia kara lingvo en Silezio.

3. Ni volas montri al niaj germanaj gesamideanoj la bedaŭrinde tro malmulte konatajn belaĵojn de nia urbo kaj de la silezia montaro.

4. La kongresejo, oportune lokita, jam estas luita. Se ni estus devintaj atendi ĝis la decido pri la kongresurbo de la XIV-a internacia Esp. Kongreso, tiu kongresejo ne plu estus estinta havebla por ni.

Do, bonvolu akcepti ĉi tiun decidon de la Breslaŭ'a kongres-komitato, kiun ankaŭ volonte aprobis la estraro de GEA. Venu, venu grandnombre, por ke nia kara lingvo disvastiĝu en la oriento de nia patrujo tiel vaste kiel en ĝiaj aliaj regionoj!

Aliĝojn jam nun akceptas la subskribinto kiel kongres-sekretario. Kotizo ĝis 1. aprilo 1922: 20 mk. (por samfamilianoj 15 mk.) estas sendota al s-o Habellok (poŝtĉekkonto Breslaŭ I. 13987).

Hanuschke,
Breslaŭ IX, Hedwigstr. 11.

Kompletigo.

Okaze de la kongreso, nome vendredon antaŭ Pentekosto, la Saksa Esp. Instituto aranĝos esp. ekzamenojn pri „kapableco" kaj „scienca pedagogia kapableco". Ni konsilas al la est. gesamideanaro profiti de la bona okazo, fari ekzamenon sen apartaj vojaĝkostaj elspezoj.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Sesa Jarkunveno de Nederlanda Federacio de Laboristoj Esperantistaj.

En Rotterdam okazis la 10-an de julio la 6-a jarkunveno de la suprenomita federacio.

El la aprobita jarraporto montriĝis, ke en la pasinta jaro la federacio faris tre multe da propaganda laboro kaj ke la membronombro nun estas 217, dividita inter 9 sekcioj.

La raporto de la kasisto montris grandan kassaldon, kvankam en la lasta jaro la federacio pagis grandan antaŭmilitan ŝuldon. Por ankoraŭ pli efike fari propagandon en la venonta jaro, la jarkunveno decidis pri la propono de plialtigo de kotizo de la sekcioj al la fed. kaso je 50%.

La kongreso reelektis kiel sekr.-kas. kaj redaktoron de „Nederland-Esperanto" (fed. parto) k-on A. Kloek. (Oni atentu ankoraŭ lian adreson: 1-e Sweelinckstr. 19, IIa, Amsterdam.)

Kiel centran personon por la „Ned. Lab. Esp. Servo" (celo: praktika utiligo de Esperanto por la laborista movado kaj per tio: propagando) la kongreso voĉdonis k-on G. P. de Bruyn, Alleeweg 9, Enschede. La sekretarioj de alilandaj lab. esp. servoj bonvolu interrilati kun li.

La estraro estas komisiita esplori la eldonon de speciala glumarko por propagandi Esperanton kaj la federacion.

Ankaŭ la kongreso akceptis proponon pri aranĝado de „Verda Semajno", t. e. kiel eble plej grandskale aranĝota propaganda semajno por malfermi la vintran propagandon.

Fine la kongreso akceptis jenan rezolucion, kiun defendos la reprezentantoj dum la konferencoj de lab. esperantistoj en Dresden kaj Praha:

„La Kongreso de N. F. de L. E. ktp., konvinkite ke la ĝenerala enkonduko de Esperanto inter la laboristaro estas afero **tute sendependa de religio aŭ politiko,** konvinkite ke tiu batalo plej efike povas okazi internacie aranĝate, estas preta aliĝi al internacia organizaĵo, kiu akceptas la du suprenomitajn starpunktojn."

Esperanta Budo

estis rimarkata en la Ekspozicio pri la Ideala Vivo, kiu okazis en London de 11-a ĝis 16-a de julio. Se ni havos sufiĉe da loko, ni raportos en venonta numero pli detale pri tiu ekspozicio.

El Stirio.

La Esp. Soc. „Por alta celo" Graz multe propagandas. En la lasta monata kunveno paroladis la prez. ĉefsekr. Sappl pri la interna ideo de Esperanto. — La kunvenon ankaŭ ĉeestis samideanino el Königsberg. — La societo petis subvencion de la Stiria registaro. — En la proksimaj tagoj komencos kurso por infanoj (20 partoprenantoj). De la societo partoprenos la konsilanto pastra moŝto d-ro Metzger kaj la prez. s-o Sappl al la Praha kongreso.

Esp. Lernejo en Auerbach.

La 6-an de Julio okazis en atendejo duaklasa de l' malsupra stacidomo en Auerbach (Vogtlando), kunveno de esp. amikoj. Post mollonga raporto pri la esp. movado oni decidis fondi esp. lernejon. La antaŭlaborojn por la efektivigo de tiu ĉi plano oni komisiis al komitato konsistanta el s-oj prof. d-ro Barth, fabrikisto H. Gerisch, urba oficestro Hertig, instruisto Müller kaj prof. Nestler. Per ordono de l' instrua ministerio jam kelkaj ĉambroj en la seminario estas disponigitaj por tiu ĉi celo.

Oka Bulgara Esperanto-Kongreso

okazos la 14-an kaj 15-an de aŭgusto en Sofia, tuj post la Dektria en Praha.

Kurso en la gimnazio de Karlovo finis sukcese. Estis disdonataj memordiplomoj al 15 sukcesintoj ĉe la ekzameno.

Esp. grupo en Pleven aranĝis la 30. majo ekskurson al urbo Soveĉ. Tie paroladis s-anoj Bl. Panĉev kaj V. Cankov; fondiĝis grupo en la virina gimnazio en Soveĉ. La grupo Pleven ankaŭ aranĝos ekspozicion (en Pleven okazos la nunjara kongreso de bulg. abstinentuloj). Tial ĝi petas la gesamideanojn, eldonejojn, redakciojn ktp., ke ili bonvolu sendi esperantaĵojn al adreso: Blagoj Panĉev en Pleven (Bulgario).

El Vladivostok.

La 17-an de aprilo en Esp. Soc. „Espero" okazis ĝenerala kunveno, dum kiu oni reelektis la komitaton. Ĉe Klubo de Poŝt-Telegrafa Oficejo estas malfermitaj esp. kursoj kun 30 partoprenantoj. Ĉe la rondo „Verda Stelo" s-o D. Ziguri gvidas kurson kun 15 personoj.

Memmortigo de Esperantisto.

En „Esperanto" ni legas la sciigon, ke s-ano Vadim Aleksandroviĉ Stopani, juna studento, redaktoro de „Ĥina Esperanto", fervora esperantisto en Shanghaj, sin mortigis. Laŭ komuniko de s-ano Lu-Si-Ĉin s-o Stopani postlasis jenan leteron: „Bonvolu, geamikoj, doni la sciigon pri mia morto al la ‚Orienta Revuo' kaj ‚Esperanto' de UEA. Ne pensu, ke mi longe dubis pri la ekzistigo de mia morto. Ne, mi mortas kun la rideto sur miaj lipoj. Ĉu oni povas timi lokon, kie oni ne estas, kaj la tempon, kiam oni ne ekzistas? Ne vera estas la opinio, ke mi malekzistigas min pro la malesperiĝo je vivo. Ne, pli vere estus la opinio, ke mi malesperiĝis je mi mem, sed ankaŭ ĝi estas ne tute vera. Ne havi propran saĝon kaj vidi ĉirkaŭe malsaĝecon estas malfacile por mi. Ha! sufiĉe. Saluton al miaj lernantinoj!"

---

iu ajn el niaj akademianoj plenumas ĉiujn. Sed ni — kaj tion ni diras post multjara observado kaj studo de la fenomenoj de la esperanta lingvovivo — ne vidas vojon kondukantan eksteren el la hodiaŭa kaoso, ol se oni trovos almenaŭ unu superan spiriton kvalifikitan kiel esperantologo; li siaflanke povos, liverinte la kadron, organizi la pridetalan laboradon de aliuloj, petante iliajn specialistajn konsilojn ktp., sed **sen unuecigante nenia unueco!**

La kadro plenigota, la grandaj konturoj ĝuste strekitaj, la principoj, — jen la ĉefaĵo. Aŭ kion oni dirus pri artisto, kiu komencus sian bildon ne per skizo grandatrajta sed per zorga ellaborado de ŝupinto kaj de plumo sur la ĉapelo, indiferente ĉu poste la spino fariĝos kurba kaj la proporcieco kriplula? For dileteco!

Dum nia vortara laborado pri Esperanto ni renkontis, ĉiutage kelkfoje, tri principajn embarasaĵojn, antaŭ kies likvido — ni insistas pri tio — ellaboro de konsekvenca vortoprovizo ne estas ebla: la hibridajn vortelementojn, la nekompletan pluformeblon de neprimitivaj adjektivoj kaj verboj kaj la mankon de atributa sufikso de enteco. Ni tre bedaŭras, ke tiujn aferojn ni devas priparoli en ĝenerala gazeto antaŭ ĝenerala publiko. Sed ĉar speciala gazeto ekzistas same malmulte kiel vere kompetenta forumo, ne restas al ni io alia, ol dediĉi daŭrigan artikolon en ĉi tiu gazeto al la temo, kiel forigi la embarasaĵojn per **tri fundamentaj reguladoj.** Ĉar tiuj reguladoj pro sia graveco kaj precipe pro la pezaĵeco kaj bone konsciata nekompetento de niaj lingvaj institucioj ne efektiviĝos rapide, estas necese, sendepende de ili jam fari komencon pri **Provizora Oficiale Rekomendata Vortaro;** la kielon ni montros en dua speciala artikolo, tiel ke en tri artikoloj ni deponis, kio ŝajnas al ni **la esenco kaj la du plej urĝaj taskoj de la Esperantologio.** Ni apenaŭ kuraĝas esperi, ke, aranĝiĝante kun ili, unuafoje oni provos apliki tion, kion ni nomis vera scienco: sinceran ĉiokonsideremon.

24. 6. 21.

En propra afero.

Letero al la redaktoro kaj publika respondo.

Niederhermsdorf ap. Dresden, 3. julio.

Tre estimata redakcio!

En via Kolonja Esperanto-jurnalo, kiun mi ĝis nun tre ŝatis, mi legis en printempo unu artikolon pri Bohemujo. Ankaŭ multaj de miaj bohemaj Esperanto-amikoj legis la artikolon, kaj ni ne povis sufiĉe miri, ke **germana** gazeto povas tiamaniere agaĉi kaj fuŝnomi bone germanajn lokojn kaj nomojn tiel, ke oni nur per ĉirkaŭvojoj ilin rekonas — ekz. Eger, Karlsbad, Tetschen, Bodenbach, Reichenberg, Budweis ktp., kiuj en la ĉeĥoslovaka respubliko nun kiel antaŭe rajtas montri sian germanan nomon apud la „ŝtatoficiala". Tiu ĉi nova peceto de germana memprikraĉo certe igas multajn legantojn de via jurnalo supozi, ke via **„dependa"** ne estas tute prava.

Kun Esperanto-saluto *R. Scheibler.*

* * *

Ni ne rajtas preterlasi doni la konvenan respondon al tia malnobla insulto, kian povis inspiri nur blinda fanatika ŝovinismo, kaj ni lasos ankaŭ al niaj legantoj prijuĝi ĝin laŭmerite.

Antaŭ ĉio ni devas konfesi, ke ni tute ne scias, kiun unu (1, li skribis per cifero) artikolon aludas s-o Sch. Ni trarigardis ĉiujn n-ojn de 20. febr. ĝis 22. majo; sed — krom en la oficialaj komunikoj de la Praha kongreskomitato — ni nenie trovis „fuŝnomitajn" germanajn lokojn de Ĉeĥoslovakio. En n-o 20 de 20. febr. (artikolo pri Reichenberg) sin trovis la nomoj Reichenberg kaj Gablonz, en n-o 23 same ni parolis pri komerca ĉambro Reichenberg, en n-o 26 pri esp. festo en Saaz, en n-o 32 ĉe opa vendado ni renkontis Reichenberg kaj Saaz. Aŭ ĉu eble Praha, Bratislava, Hradec Kralové, Olomouc kaj Brno estas purgermanaj urboj? Tion ni ne scias. Eble s-o Sch. volas aludi la tabelon de la veturprezoj en n-o 29 de 24. aprilo, kiun ni eltiris el la oficiala (do ne ŝanĝota) 8-a komuniko de la kongreskomitato? Per tiu tabelo ni eĉ unuafoje sciiĝis, ke Cheb — ĝis tiam enigmo por ni — estas Eger, Cmunt — Gmünd kaj Dečin — Tetschen. Kiun eble germanan lokon signifas Sob, tion ni eĉ nodiaŭ ne scias. Ja ni ne povas scii parkere la kompletan liston de ĉiuj ĉeĥaj urbo- kaj vilaĝonomoj kun apudaj germanaj, same kiel ni ne povas scii la duoblajn aŭ eĉ trioblajn nomojn de ĉiuj, iam hungaraj, rumanaj urboj, ekz. Sibiu (rum.), la sama urbo, kiun hungaroj nomas Nagyszeben kaj germanoj Hermannstadt. Ĉu hungaroj same ekscitiĝu (kiel s-o Sch.), se ili legas Cluj anstataŭ Koloszvar, Zagreb anst. Agram, Bratislava anst. Pozsoni (germ. Pressburg) ktp.?

Se germana ĉeĥoslovakiano sendas al ni artikolon kun la germanaj nomoj, kompreneble ni ilin presos germane; sed se ĉeĥo alsendas artikolon kun la ĉeĥaj nomoj, same kompreneble ni ilin presos ĉeĥe; ĉar — tiun ŝajne tre disvastigitan eraran opinion ni devas nepre refuti, ke ET estas **germana** (aŭ eĉ Kolonja!) jurnalo, kiun substrekis s-o Sch. Ripete kaj ripete ni akcentadas, ke ET tute ne estas germana sed esence **internacia** jurnalo. Ke hazarde la eldonejo kaj la redaktoro estas germanaj, estas ĉe tio tute indiferente.

La logiko de s-o Sch. estas ankaŭ admirinda. Li skribas „En via . . . jurnalo, kiun mi **ĝis nun** tre ŝatis, mi legis en **printempo** . . ." Se s-o Sch. jam en printempo legis la lin ekscitintajn bohemajn urbnomojn, kial li **ĝis nun** tre ŝatis la jurnalon kaj nun — kelkajn monatojn post la aludita artikolo — subite ĉesas ŝati ĝin? Kial, entute, nur nun li skribas tian edifan leteron, se jam en printempo — — Ĉio estas tiom pli miriga, ĉar s-o Sch. laŭ nia scio tute ne estas abonanto de ET. Ĉu eble li direktis sian leteron al malĝusta adreso? Tiukaze ni pardonus lin.

La letero estas skribita en germana lingvo, nur unu vorto, la substrekita „dependa", estas en Esperanto. Laŭ tiu vorto ni supozas, ke s-o Sch. ne aŭ nur malbone scipovas Esperanton, ĉar li volis esprimi ĝuste la malon: „sendependa".

Pri la cetero ni ne volas okupi nin. La insulto, kiun s-o Sch. faras al la redaktoro rilate lian bonan patriotecon, estas tiel malnobla, tiel aĉa, ke la legantoj, germanaj kaj eksterlandaj, juĝu mem. Ni ankaŭ ne volas konstati, kia faro estis pli utila al Germanlando: la skribo de insulta letero de fanatika ŝovinisto al bona sed vastkora patrioto, aŭ la kuraĝa fondo de internacia entrepreno, kia estas ET, de germana civitano en tempo, kiam la duona mondo havas ankoraŭ siajn antaŭjuĝojn kontraŭ ĉia germanajo.

Estonte ni entute ne plu rilatiĝos al eventualaj similaj skribaĉoj, sed direktos ilin tuj post ricevo tien kien ili meritas esti ĵetataj: en la paperkorbon, aŭ ni publikigos ilin senkomentarie en nia jurnalo, por ke la tutmonda legantaro prijuĝu ilin kaj iliajn skribintojn laŭmerite. *T. J.*

Gazetaro.

LES ECHOS DE L'EXPORTATION, grava semajna eksporta revuo franca, publikigis en n-o de 30. junio la voĉdonon de Orana komerca ĉambro favoran al angla kiel internacia lingvo, kaj aldonas, ke „por eviti tiun ĉi neegalecon, oni devas akcepti la uzadon de neŭtrala helpa lingvo, simpla kaj facila kiel Esperanto, en internaciaj rilatoj."

KURJER LODZKI. N-o 182 de 6. julio.
Kun artikoleto pri Esp. ĉe Ligo de Nacioj.

PRAGER PRESSE. 3. julio.
Germanlingva tagĵurnalo de Praha kun tutkolona esperantlingva rubriko „Informoj el Ĉeĥoslovakio".

BOTE FÜR STADT UND LAND, Xanten, Germ., kaj RHEINBERGER ZEITUNG, de 11. julio, enhavis raporton pri parolado de s-o instr. Wolfertz el Menzelen pri Esperanto.

ESSENER VOLKSZEITUNG, Essen, Germ., 8. julio, raportas pri „Esperanto en la lernejoj de Offenbach" kaj pri la du holandaj s-anoj biciklantaj ĉirkaŭ la mondo.

VOLKSZEITUNG, Bromberg, Polio. N-oj 26-28.
Germanlingva socialista gazeto, redaktata de nia s-ano Pankratz, tre favora al Esperanto. La preselo kaj redaktejo estis antaŭ nelonge difektataj de popolamaso.

Recenzejo.

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA. 25. majo.
Enhavas interalie konsilojn por unuformigo de la metodo sekvota en la enkonduko de novaj vortoj, de E. Grosjean-Maupin; atentindan alvokon de Gustav Ziegler; la kontojn de la X-a kongreso; raporton pri la kunveno de la Lingva Komitato, la specialistaj kunvenoj, festoj kaj ekskursoj en Hago; la 4.-8. komunikojn de la XIII-a.

BRAZILA ESPERANTISTO. Jan.-aprilo.
Detalaj raportoj ilustritaj pri la VI-a Brazila Kongreso de Esperanto (20.-24. aprilo 1921) en Rio de Janeiro.

LA PROGRESO. Junio.
Raportas pri fondo de la — kvara (!) ĉsl. esp. gazeto. Oni devas bedaŭri la malkonkordon inter la ĉsl. samideanoj, precipe antaŭ la kongreso de Praha, kvankam oni bone komprenas, ke la incitemaj kaj tro unuflanke naciemaj (por esp. gazeto) artikoloj en la „Progreso" malplaĉas al multaj eĉ ĉsl. esperantistoj.

ESPERANTO PRAKTIKO. Julio.
Kun diversaj interesaj, precipe prilingvaj artikoloj.

LA RADIO. Majo-junio.
Hektografita gazeteto de Siedlca Grupo Esperantista.

Venu al Dresden!

Pli ol 500 partoprenontoj el 20 nacioj estis anoncitaj por la antaŭkongreso jam je la 14-a de julio. 17 hoteloj kaj restoracioj havos dum la kongrestagoj manĝokarton en Esperanto. La urbestro de Dresden akceptis la honoran prezidon de la kongreso.

La Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof

Memorlibreto, presita sur arta papero, kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografaĵoj pri la funebra ceremonio kaj la tombo de la Majstro,

estos vendata

dum la kongresoj en Dresden kaj Praha po 30 germ. mk. resp. 30 ĉsl. kr. La duono estas destinita

por Monumento

sur la tombo de D-ro Zamenhof.

Ni rekomendas la belan verketon al la atento de ĉiuj samideanoj.



Razaparatoj

por poŝo, el latuno arĝentumita, en bela nikelumita ujo, tegita per veluro.

M&C N

Bruligiloj. Lasta novaĵo: Bruligilo „Patentkrajono" n-ro 116, uzebla kiel bruligilo same kiel krajono. Objekto por ĉiutaga uzado. — Seriozaj aĉetontoj mendu nian prezaron. Ni serĉas reprezentantojn.

Muscat & Christlein, Nürnberg, Germ.

Anoncetoj.

PETO AL HOLANDANOJ. Du 22-jaraj s-anoj, metilistoj, intencas elmigri Holandon; pro tio ili deziras interrilati kun holandaj gesamideanoj, kiuj ebligus trovi laboron (tajloroj). — Ges-anoj, kiuj estus emaj helpi, estas petataj skribi al Willy Puls, Gelsenkirchen, Germ., Grenzstr. 116-IV.

SARATOV (Rus.) Doktor-edzino Valerio Solonevič-Kunz petas samideanojn en Saratov (Rusujo) sciigi ŝiajn gepatrojn (ges-oj Kunz. Pokrovskaja 26, aŭ Rus-Azia Banko, s-o Ivanovič Kunz), ke ŝi nun loĝas en Polio, urbo Zychlin, distrikto Kutno, lando Varsovia.

ESP. SIGELMARKOJ. Kolekto de 215 diversaj sigelmarkoj ĉiuj eldonitaj de mi. Mi sendas kontraŭ 5 pesetoj en hispana mono aŭ 12 respond-kuponoj. Joan Amades, Peu de la Creu 15, Barcelona, Hisp.

POR GRUPA LEGADO tre taŭgas la „Ses noveloj el la hungara literaturo". Poŝformato. En letero sendebla. Interesa. Bonstila. Sendu 5 germ. mk. aŭ 1 fr. fk. en letero kaj vi ricevos ĝin registrite senditan. Paŭlo Balkanyi, Budapest VI, Hung., Hajos u. 15-II-2.

FERVOJISTOJ! La eldono de fervoja fakvortaro estas nepre necesa. Kolektu do tiajn fakvortojn skribante ilin sur slipoj (105×80 mm) nur unuflanke kaj sendu ĉion al Ober-Gütervorsteher Ernst Muthschall, Forst, Germ., Gubenerstr. 28. — La ordinaraj vortoj jam estas tradukitaj. Alsendo de fervojaj regularoj ktp. estus danke akceptata.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Alfred Neupert, Leipzig-Mö., Wedellstr. 17, Germ., deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandaj samideanoj (precipe pri lernej-aferoj).

N. M. Ivanov-Kaljanov, urbo Urjum, Vjatka gubernio, Rusio, Revolucionnaja 4, deziras korespondi ĉiuteme kun la tuta mondo en la lingvoj esperanta, germana, franca kaj itala. Li ĉiam nepre respondos. Interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

Vladimiro Katalinov, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj, per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. Tuj respondos. (15-jara.) Adreso: Petrogrado, Gorohovaja 55, loĝ. 15.

Aleksandro Dmitriev, 15-jara, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj, per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj. Tuj respondos. Adreso: Rusio, urbo Velikije-Luki, Baranovskaja st. 28.

Kiu deziras korespondadi kun gesamideanoj de Simbirsk, Rusio, skribu al M. S. Kleverov, Simbirsk, strato de Leono Tolstoj 55.

Fraŭlo Jozefo Benagez, Esp. Grupo, Centro de Dependientes, str. Prado 61, Habana, Kuba insulo, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj pri ĉiu afero. Mi ĉiam kaj tuj respondos.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Ŝidlóvskaja.

(28-a daŭrigo.)

Samtempe la juna John ekhontis, ke li tiel malĝentile forlasis Mateon. Li rapide revenis, sonorigis kaj sufiĉe maldelikate petis elirigi s-on Lozinski, ĉar mankas al li tempo por atendi: tempo estas mono.

La maljuna sinjorino rigardis lin kun miro; Anna, kiu jam estis forportinta sian paketon en la kuirejon kaj nun suprenvolvinte la jupon, komencis lavi la plankon, rapide ordigis sian veston kaj eliris sur la peronon. Ĉiuj tri staris antaŭ la doma pordo kaj rigardadis dekstren kaj maldekstren. Neniu similanta Mateon estis videbla sur la preskaŭ senhoma strato.

„Eble, li iris stacidomon per alia vojo?" supozis John.

Anna dubante skuis la kapon.

„Ne!" ŝi diris. „Li konas neniujn vojojn ĉi tie."

Ŝi rigardis la straton, la vicojn de unufasonaj domoj, kaj larmoj plenigis ŝiajn okulojn.

„Nu, mia kara", diris la sinjorino. „Sencele estas nun rigardaĉi . . . Nenion vi vidos . . . Ne por tio ja mi vin dungis. Jen la planko ankoraŭ ne estas finlavita!"

„Eble li revenos?" diris Anna.

„Nu! Ĉu vi restos staranta tie antaŭ la sojlo ĝis vespero?" per iom ekscitita tono diris la sinjorino.

„Li estas por mi la sola proksima homo en la lando", mallaŭte diris Anna.

„Dankon al Dio! La sola!" kriis la sinjorino. „Por juna knabino tio jam estas tro!"

Anna ĵetis la lastan rigardon en la direkto al la strato. El post la angulo vidiĝis John, demandanta preterirantojn. Poste ankaŭ li malaperis. La strato senhomiĝis. Anna ekmemoris, ke ŝi ne posedas eĉ la adreson de Mr. Bork, do ŝi estas nun same perdita kiel Mateo . . .

Baldaŭ la pordo fermiĝis post ŝi, kaj la domo de la maljuna sinjorino, sur kies perono antaŭ malfermita pordo jus staris konfuzmienaj homoj, maltrankvile haltigante kaj demandante preterpaŝantojn, tiu domo nun ree enviciĝis kun apudaj domoj, tute simila al ili: la sama pordo kun malbrila vitro kaj kun nigra numero: 1235.

Dume en la apuda strateto unu el la preterirantoj, ĉe kiu John jus estis informiĝinta, — kunpuŝiĝis kun stranga viro, kiu paŝis, kvazaŭ posttrenante nevideblan ŝarĝon, kaj ofte rigardante posten. La amerikano bonvole prenis lian manon, alkondukis lin ĝis la angulo de la strato kaj montris en la direkto al la strato.

„La tridekkvina, la tridekkvina", li diris afable (kompreneble, angle). Poste, tute certa, ke kun tiel preciza sciigo la viro nepre trovos sian vojon, li kuris fari sian urĝan aferon, dum Mateo iom meditinte ekrigardis posten kaj, alirinte la plej proksiman domon, sonorigis. La pordon malŝlosis nekonata virino kun vizaĝo sulkiĝinta kaj nigraj bukloj ambaŭflanke de la kapo. Ŝi ion demandis kolere kaj brufermis la pordon. Tio sama okazis ĉe la dua domo, ĉe la tria . . .

Ĉe la angulo ŝajnis al li, ke li devas sin turni angulen, kaj li sin turnis unu fojon, duan fojon, poste, vidante fontanon, kiun, laŭ lia memoro, ili antaŭ unu horo preterpaŝis, li turnis sin ankoraŭ unu fojon. Ree li troviĝis en tia sama strato, sed la ombroj nun sterniĝis ĉe la dekstra flanko, kaj la suno brile lumigis la kurtenojn de la maldekstra flanko. Malproksime, kvazaŭ de post monto, ronkis vagonaro. Mateo haltis meze de la strato, kiel ŝipo, kiu sin deŝiris de l' ankro kaj navigas laŭ fluo, — kaj, ne esperante jam trovi la loĝejon de la maljuna sinjorino, li sin direktis tien, de kie aŭdiĝis la bruado.

En la sama tempo, sur la strato, kiun jus trairis la Loziŝĉano, ree kuris John, tute malkvieta kaj malĝoja. La pordo de la domo n-o 1235 ree malfermiĝis, ree sur la perono staris du virinoj kun la juna hebreo, interkonsiliĝante kaj ĉirkaŭrigardante. La okuloj de Anna estis larmoplenaj. John konfuzite gestadis.

Malfrue vespere Anna, maĝoja, kun plorruĝaj okuloj, finis sian unuan ofican tagon. Ŝi estis farinta multege da laboro, ĉar jam pli ol du semajnojn la sinjorino ne havis servistinon. Krome, en tiu semajnotago ĉe la sinjorino ordinare ludis kartojn ŝiaj kunloĝantoj kaj gastoj. Oni disiĝis post noktomezo, kaj Anna, laca kaj ĉagrenita, la tutan vesperon estis atendanta en apuda ĉambro, por aperi tuj kiam ŝi estos vokata.

Disiĝante, la gastoj dankis la maljunan sinjorinon pro la agrable pasigita vespero.

„Jes! Verdire, nur ĉe vi oni sin sentas iafoje kiel en nia patrujo", diris unu gasto, kisante la manon de la sinjorino. „Kiamaniere vi scias tion aranĝi?"

(Daŭrigota.)

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpreso la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpreso kostas la duoblon.)

RUSAJ DRAMAJ ARTISTOJ interŝanĝe deziras ricevi notojn por kantado, novajn teatrajn verkojn en esperanta, franca, itala, rusa lingvoj, — esperantan literaturaĵon, gazetojn ktp., ilustr. kartojn pri teatraj spektakloj. Ni tre dankeme sendos rusajn esp literaturaĵojn, gazetojn, muzikaĵojn, papermonojn, poŝtmarkojn ktp. Skribu al: Drama artisto V. J. Kaĉalin, Petrogrado, Mitavskij, pereulok domo n-o 3, kvart. n-o 27.

P. MEDEM, KOVNO. Forveturonte baldaŭ eksterlanden por ĉ. 2 monatoj, mi petas, ke miaj simpatiaj gekorespondantoj prokrastu la interkorespondadon ĝis oktobro. Saluton!

GEINSTRUISTOJ. S-o L. Borkowski, instruisto, Poznan, ul. Rozana 4a, Poluio, priparolonte temon pri instruistino, petas informi lin, kiel la afero staras en aliaj landoj (germanajn kondiĉojn li ankaŭ sufiĉe konas), speciale ĉu instruistinoj havas la saman a) nombron da devigaj lecionoj semajne, b) salajron kiel instruistoj samaĝaj.

VORTARON GERMANAN-ESPERANTAN de prof. Christaller deziras tuj aĉeti s-o Josef Mader, Brockmanngasse 71, Graz, Aŭstrio.

RUSIO. Al s-oj Najdin en Omsk kaj Valentinov en Ĥerson. Mi danke ricevis viajn presaĵojn kaj sendis al vi rekomendite interŝanĝon, sed ĝi revenis kun surstampo „Non admis". Volu informi min pri la vojo, per kiu mi povas ree sendi ilin al vi. Iv. Krestanoff, Karlovo (Bulg.).

ESPERANTISTOJ EN PARIZO. Hispana samideano bezonas malgrandan, ne meblitan loĝejon en Parizo aŭ ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ankaŭ li serĉas laboron kiel lignaĵisto. La pasintan jaron li loĝis en Parizo kaj parolas francan lingvon. Se iu afabla kamarado povas ĝin oferti al li, sciigu ĝin al jenaj adresoj: Marguerite Petit, 26 Boulevard de la Chapelle, 10 arrd., Paris, aŭ s-o Johano Compte, strato Lazareto 32, Barcelona, Hispanio.

EDZIĜO. Laboristo, ĉ. 35-jara, deziras konatiĝi kun samaĝa esperantistino de kiu ajn nacieco por eventuala edziĝo. Alskriboj kun fotografaĵo estu adresataj al s-o D. Holm, Källgatan 4, Eskilstuna, Svedio.

EDZIĜOPETO. Tridekjarulo deziras edziĝi al fraŭlino aŭ vidvino, kiu laboras por la esp. lingvo; ŝi devas esti preskaŭ samaĝa. Sendu portreton, poste mi sendos la mian. Mi estas laboristo. S-o Mariano Donto, str. Prado 110, Habana, Kuba.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

(Dufoja enpreso kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpreso kostas la duoblon.)

S-o Liudas Alseika, Ŝiauliai, Litovio, Pasadna g-ve 19, interŝanĝas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Eugenia Butnevičaite, Ŝiauliai, Litovio, Stotes g-ve 8, interŝanĝas kaj korespondas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Zofia Vaicekauskaite, Ŝiauliai, Litovio, Pasadna g-ve 19, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.).

S-o Bruno Ebert, Bydgoszcz-Okole (Pol.), Wroclawska 6, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondadi per ilustr. poŝtkartoj.

S-o Bronislaw Kruszczynski, Bydgoszcz (Pol.), Siemiradzkiego 10, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj belajn vidindaĵojn. Certe al ĉiu respondos.

Siedlce, str. Kilinskiego 11, Polio, s-o K. Bujnowski, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, leterojn kun ĉiuj landoj; certe respondos.

Siedlce, str. 3-go Maja 28, Polio, s-o Cz. Pruski, del. UEA, deziras korespondi kun partoprenantoj de la XIII-a.

S-o Rudolfo Appel, Budapest IX, Üllöi ut 50, Hung., deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

S-o Adalberto Weisz, Budapest IX, Üllöi ut 63 I-5, Hung., deziras korespondadi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj; tuj respondos.

S-o Haluska Akos, teknikisto, Budapest VII, Hernad u. 26-III-30, Hung., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo; ĉiam respondos.

S-o Izaak Spiro, lernanto, Zoppot bei Danzig, Kronprinzenstr. 4, Persönlich, deziras korespondadi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, papermonojn kaj monbiletojn.

Chr. Meyer, Kernstrasse 44, I., Nürnberg, Germ., deziras korespondi kun geeksterlandanoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj. Tuj respondos.

S-o Georg Vogel, Breslau, Germ., Gartenstr. 28, ptr., deziras korespondadi letere aŭ poŝtkarte kun ĉiulandanoj. Poŝtmarkoj bildflanke.

S-o Walter Beer, Breslau, Friedrichstr. 12, deziras korespondadi kun geanoj de ĉiuj landoj per bildkartoj. Poŝtmarkoj bildflanke.

Otto Weselmann, Düsseldorf, Nordstr. 77, II., interŝanĝas pensojn pri karikatur-desegno kaj reklam-desegno, per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj.

Arbeiter-Esperantisten-Gruppe, Breslau (Germ.), Brandenburgerstr. 16; ĝiaj 50 membroj deziras korespondi kun ĉiulandanoj letere aŭ karte pri ĉiuj temoj; ĉiam respondos.

S-o Max Rudolph, Plauen i. V. (Germ.), Wieprechtstr. 52, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. kun la tuta mondo; ĉiam respondos.

S-o Max Pepperl, Plauen i. V. (Germ.), Neundorferstr. 176 (20-jara) deziras korespondadi precipe kun junaj fraŭlinoj en la tuta mondo. Tuj kaj la tutan jaron ĉiam nepre respondos.

Ĉiuj gesamideanoj, kiuj sendas ĉ. egalval. nedif. stampitajn poŝtmarkojn negermanajn, tuj ricevos 10 aŭ 20 poŝtkartojn ilustritajn de la belega Rejnlando. Paul Becher, Köln a. Rh., Burgunderstr. 7. — Ankaŭ korespondas per poŝtkartoj, leteroj (bfl.) kun ĉiuj landoj.

S-o Hermann Petermann, Hagen i. W., Fleyerstr. 57, Germ., deziras interŝanĝi artajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Certe kaj tuj respondos.

Kiu sendos al mi 50-50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Wolfertz, instruisto, Menzelen-West, Rejnlando, Germ.

Fritz Thiel, Swinemünde (Germ.), Seestr. 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Paul Becher, poŝtoficisto, Köln, Germ., Burgunderstr. 7, deziras korespondadi per leteroj kaj poŝtkartoj kun gesamideanoj en ĉiu lando.

S-o E. Friebel, instruisto, del. de UEA, Dresden-Dobritz, Residenzstr. 24, I., serĉas gekorespondemulojn en la tuta mondo. (Leteroj pri ĉiu temo, il. poŝtkartoj de vidindaĵoj, de la popola vivo.) Donas informojn pri komerco kaj industrio en sia regiono. Preferas neinterrompitan korespondadon.

Poŝtmarkoj Nederlandaj.

Ĉiu, kiu sendos al mi minimume 200 da afrank-filantropiaj, kampposta, aerpoŝtaj poŝtmarkoj de sia lando, ricevos de mi saman kvanton da holandaj poŝtmarkoj.

Skribu legeble vian adreson.

S-o C. D. de Smet, Noorddijk 60, Wormerveer, Holando.

5a Internacia Foiro de Frankfurt a. m.

25. septembro ĝis 1. oktobro 1921.

Importo. 30 branĉoj. Eksporto.

Presaĵoj en germana, angla, dana, franca, hispana, itala, nederlanda, norvega, sveda kaj esperanta lingvoj.

„Antaŭ-Katalogo" kun plurlingva kaj esperanta registro, „Listo de Komercaĵoj" en Esperanto.

Detalajn informojn petu tuj de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. m. Germ.

ARGENTINIO.

Reprezentadon de ĉiuspecaj komercaĵoj, facile vendeblaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksoficisto teknika de la Argentinia Terkultura Ministerio. Konatiĝis bonege dum 7 jaroj kun la tieaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentinion, trapasonte okcident- kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Kelety, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transsilvanio, Rumanio; poste: Kelety-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentinio.

II-a Internacia Foiro de Reichenberg

Ĉeĥoslovakio.

13.—21. de aŭg. 1921.

Unua kaj plej granda kvalita merkato de la tuta grandindustrio de Ĉeĥoslovakio. Proksimume 3000 ekspozantoj de la en- kaj eksterlando. Plej bona kaj plej malmultekosta okazo por aĉetoj en 20 diversaj branĉoj. Pasportaj facilaĵoj, fervojaj rabatoj, apartaj vagonaroj. **Komerca debito de la I-a Foiro 3/4 miliardoj kronoj ĉsl.** Vizito de la Foiro estas bone kunigebla kun la vizito de la XIII-a Universala Esperanto Kongreso en Prago, kun la vizito de la famekonataj nordbohemaj banurboj kaj de la foiro de Leipzig.

Informoj:

Messeamt Reichenberg

Ĉeĥoslovakio.

Venu al Reichenberg kaj vidu la praktikan uzon de Esperanto ĉe la foiro.

EN- KAJ EKSTERLANDAJ MINERALOJ

unuopaj pecoj kaj kolektaĵoj, krudaj kaj facetitaj briliantoj estas prezinde liverataj de

Magazeno de mineraloj

A. Jahn, Plauen i. V. (Germ.)

Ob. Graben 9.

Eksterlandaj liverantoj serĉataj.

Kontorartikloj

ĉiuspecaj

paperaĵoj, stampiloj, stampil-kusenoj, emajlelpendaĵoj (ŝildoj) ĉiaspecaj.

Liverado de libroj germanaj kaj esperantaj.

Reala servado. ★ Malkaraj prezoj.

Seriozaj reprezentantoj serĉataj.

Specimenoj sendotaj kontraŭ resp.-kup., plipagon mi repagos.

Rob. Pfennigwerth, Hirschfelde

(Saksujo).

Poŝtĉekkonto Dresden n-o 4761. — Bankkonto Loebauerbank Hirschfelde (Saks.).

Sinjoroj Esperantistoj!

Se vi volas helpi serioze la internaciiĝon kaj disvolviĝon de la lingvo Esperanto, abonu senpere je la nova internacia ilustrita semajna gazeto

„De Prinses".

Provizore tiu ĉi semajna gazeto aperos en la franca, germana, angla, holanda kaj esperanta lingvoj. Ĝi enhavos ĉion tutmondan (ekz. sporto, arto kaj sciencoj, agrikulturo, brutarbredado ktp., mallongvorte „la naturo en vorto kaj bildo" de la tuta mondo).

Sendu vian abonon kaj pagon senprokraste al nia reprezentanto s-o **J. J. v. Wensveen,** Warmoesstraat 118, Wormerveer, Holando. Ekzemplero 15 cendojn plus afranko. Jarabono plus afranko: 7 guldenojn 80 cendojn.

Abonu tuj je tiu ĉi interesa gazeto! Kolportistoj havas rabaton.

Filatelistoj! **Malofta okazo!**

Ĉi tiun ĉarman stampilon ni sendos al vi

sur ordinara poŝtkarto kontraŭ	1.— mk.
sur fest-poŝtkarto kun **oficiale enpresita poŝtmarko** (15 pfen.)	1.50 mk.
sur 3 fest-poŝtkartoj (10, 15, 30 pfen.)	4.— mk.
sur 6 fest-poŝtkartoj (la tuta serio 10, 15, 30, 40, 60, 80 pfen.)	8.— mk.

Sendu la monon per rekomendita letero al

Gefratoj Fischer, Nürnberg,

Fünferplatz.

Post la festo (23. julio) plialtiĝo de la prezoj po 25%.

„SCHARLACH" ACETILEN-LAMPOJ

por domo, metio, industrio, trafiko kaj agrikulturo.



Tablo- kaj murolampoj. — Ĉiuspecaj lanternoj.

Seriozaj firmoj postulu katalogojn kaj detalojn.

Fabriko de Metalaĵoj

Otto Scharlach, Nürnberg,

(Germanujo).